Laŭzana Esperanto-Societo
Februaro 2021 - n-ro 02

# Laŭzana informilo

*Ĉiuj el niaj kunsidoj aperas ĉe :* ***eventaservo.org/o/LES***

***Venontaj kunsidoj:***

- Lu, la 1-an de marto *Cléa prelegos*
- Lu, la 5-an de aprilo *Decidota*
- Lu, la 3-an de majo *Decidota*
- Sa, la 19-an de junio *Ekskurso*

**! ! ! ! ! ATENTU LA ŜANĜON DE DATO ! ! ! ! !**

**Marde, la 2-an de februaro 2021**

**je la 20-a en *Espace Dickens* en Laŭzano**

## Ĝenerala Asembleo

## Insulo de la Rozoj

*La Esperantista Respubliko de la Insulo de la Rozoj ekzistis dum 3 monatoj kiel mikronacio marborde de la Adriatiko norde de Italio.*



Tio komenciĝis en 1964, kiam la itala inĝeniero, Giorgio Rosa, ricevis ŝtatan permeson testi novan teknikon por la konstruado de platformo de 400 $m^2$ ripozanta sur la marfundo.

Oni scias malmulton pri la evoluo de la konstruaĵo kaj ĝiaj sciencaj uzoj. Ŝajnas ankaŭ, ke malgranda grupo de individuoj aĉetis la insulon de Giorgio Rosa. Poste aperis restoracion, noktoklubon, suvenirbutikon kaj poŝtoficejon. Ĝi bonvenigis pli kaj pli da turistoj.

La 1-an de majo 1968 la artefarita insulo deklaris sian statuson, kiel sendependa ŝtato kaj elektis esperanton, kiel oficiala lingvo por montri la internacian karakteron de la insulo. De nun la mono falis grandkvante. La suvereneco de la insulo estis markita per la monfarado de valuto, poŝtmarko kaj kreado de nova flago. La oficiala nomo de la tiu lando estis *"Esperantista respubliko de la Insulo de la Rozoj"* (memore al Rosa).

La itala registaro ne aprezis la kontraŭleĝan konstitucion de ĉi tiu nova lando en ĝiaj maraj teritorioj. La 24-an de julio 1968 oficialaj reprezentantoj de Italio venis kaj nome de la ŝtato senbatale kaptis la insulon. La 13-an de februaro 1969 la platformo estis tute detruita.

En decembro 2020 Netflix Anoncis la lanĉon de plurlingva filmo pri la historio de la Insulo de la Rozoj.

*youtu.be/FS1Mq_gd-Bs*

Rosario

**Laŭzana Esperanto-Societo**

pa. F. Randin

ch. de la Vallombreuse 14

CH - 1004 Lausanne

sekretario@eo-l.ch

+41 21 647 29 28

facebook.com/esperantolausanne

youtube.com …*esperantolausanne*

dailymotion.com/esperantolausanne

poŝtĉekkonto: CCP 10-26785-8

**Komitato 2020**

Prezidanto; Maryse Tissot (079 408 71 76)
Vicprezidanto: Knud Sunier (079 210 97 75)
Sekretario; François Randin (076 369 29 17)
Kasisto; Françoise Pétermann (079 517 44 43)
Redaktoro; Rosario Scopelliti (079 264 41 08)

## La komitato informas:

**Nia programo aperas en** https://eventaservo.org/o/LES











Jam kvin jaroj …

**REMEMORU**

http://www.cdeli.org/fenomeno-esperanto

# LA FANTOMOJ DE LA LAGO *versio A, parto 2*





La aŭtoro de la artikolo aŭdis pri tiuj rumoroj, sed li mem tute ne iris al tiu loko; li nur disvolvis fantaziegajn hipotezojn. Mi diskrete ridetas post tiu legado.

Miaj amikoj diras, ke ili volas iri dormi, ĉar la hordiferenco komencas sentiĝi. Mi deziras bonan ripozon al ili kaj anoncas la matenmanĝon por la naŭa.

Mi iras al mia komputilo kaj rete serĉas pri “fenomeno sur la Lemana lago”. Mi nenion trovas kaj neniu retloko havas tekston pri strangaj aperaĵoj. Enreteje nur aperas la referencoj de la gazeta artikolo, kiun mi ĵus legis, nenio pli. Eble serĉante pri “restoracioj” mi trovos klarigojn. Nur ok situas en tiu regiono, el kiuj du staras borde de la lago. Plie mi malkovras en “Buchillon” kabanon apartenantan al klubo de maristoj nomita “La Olda Ŝipo”, en kiu dufoje semajne oni proponas specialan manĝon por “observi aperaĵojn sur la lago”. Bizara invito.

Nun miaj palpebroj faletas kaj mi decidas enlitiĝi. La dormo ne alvenas. Mi turnas kaj returnas min en lite batalante kontraŭ ideaĉoj, kiuj eniras mian kapon. Kial? Ĉu eblas? Ĉu miaj amikoj serĉas esoterajn eksperimentojn? Mi enketos morgaŭ. Mi ektimas koŝmari… inkubsonĝi pri eksteranoj. Finfine mi endormiĝas.

Mi vekiĝas, kiam la suno enĉiele fajriĝas. Mi pensas: «*Belega tago en perspektivo*». Mi pensas, ke miaj amikoj ankoraŭ dormas; mi nenion aŭdas. Nur iuj birdkantoj perfidas la silenton. Atendante mi surtabligas matenmanĝaĵojn por ĉiuj. Subite sonoras la telefono. Mia edzino informas min, ke ŝi rehejmeniĝos postmorgaŭ; de tri tagoj ŝi vizitas sian maljunan patrinon en Valezo.

Ŝi demandas al mi: «*Diru, kara mia, ĉu alvenis viaj amikoj senprobleme? Mi aŭdis, ke oni fermis la flughavenon hieraŭ dum pluraj horoj, kaŭze de ventegoj.*» Mi tuj trankviligas ŝin: «*Ne zorgu, ĉio disvolviĝis bone kaj normale. Kaj mi eĉ sukcesis prepari manĝaĵon por ni ĉiuj.*» Ŝi gratulas min, ĉar ŝi scias, ke mi ne estas fama kuiristo. Mi demandas novaĵojn pri ŝia patrino. Ŝi konfirmas al mi, ke ĉiuj ĉe ŝi bonfartas kaj ke ŝi ankaŭ vizitos sian fraton ĉiposttagmeze. «*Salutu ĉiujn de mi kaj transdonu al via patrino miajn bondezirojn. Ho, pardonu, kara mia, mi aŭdis niajn gastojn alveni. Mi vin alvokos pli poste … Kisoj … Ho kara … ho …*» Tro malfrue. Ŝi jam rompis la komunikadon. Mi turnas min por bonvenigi miajn amikojn.

«*Bonan matenon. Ĉu vi bone dormis?*» «*Jes, dankon*» respondas Mario, kiu samtempe rigardas strangmaniere sian edzinon, kiu diras: «*Fakte Mario ne ĉion diris al vi hieraŭ vespere. Delonge li membras en esotera klubo kebeka. Antaŭ du monatoj li ricevis leteron, en kiu kuŝis tiu gazeto… kun manskribita adreso, situita en Svislando kaj bizara kodo.*» Mi rimarkas, ke Mario estas tre emociita. Observante min li viŝas larmon.






Giorgio Rosa 1935 – 2017




**Por spekti la filmon en la franca:**

https://filmsrip.net/12877/l-incroyable-histoire-de-l-ile-de-la-rose/



## Intervjuo de Monique Golaz, fidela membro de LES

(Fare de Francisko)



*- Dankon pro via konsento respondi al mi. Prezentu vin kelkfraze.*

**Tute originala laŭzananino, mi naskiĝis tie en 1938. Post komerca studo mi laboris ĉe apoteka grocisto. Mi havis fraton kaj fratinon. Mi neniam edziniĝis. Poste mi eniris kiel oficistino en la Vaŭda Ŝtato, kie mi emeritiĝis en 2000.**

*- Kiam vi aŭdis pri esperanto la unuan fojon?*

**Iam, kun Giulio, mi marŝis en la bazaro de *la Palud*, kiam, vidante la budon de LES, ni decidís informi nin pri esperanto, kiun ni ne konis.**

*- Kiam vi decidis studi esperanton?*

**Tuj ni konsentis sekvi la kurson ĉe Francisko.**

*- Kion pensis via familio kaj viaj amikoj sciante, ke vi decidis studi esperanton?*

**Nenion.**

*- Ĉu vi havas membrojn en via familio aŭ amikojn, kiuj estas esperantistoj?*

**Ne.**

*- Ĉu vi rememoras vian unuan kongreson?*

**En 2012 Giulio kaj mi aliĝis al la trasicilia vojaĝo organizita de LES, alcele partopreni la *Italan Kongreson*.**

**PS: Post doma akcidento, en februaro 2020, mi estis operaciita kaj restis kelkajn monatojn en ripozulejo. Mi nun malrapide revenas al esperanto.**